

**BENELUKSA KONGRESO
&
PACO-EVENTO**

**leper (Belgio)
23-25 septembro**

Packoncerto

Vamos pra Lutar

Sub gvido de Rik Decramer

LIED OM AFSTAND

Lingvo. La nederlanda

Teksto. *Herman Verbeek, "ribelema" pastro en la episkopejo Groningen (NL) kaj ĝis 1994 EU-parlamentano, ĉefe poeto.*

Muziko kaj aranĝo. *Rik Decramer*

Tien, kien ĉiuj iras, restu for de tie.

Tie, kie ĉiuj foriras, restu.

Tie, kie ĉiuj kunagas, ne kunagu,

Tie, kie ĉiuj jesas, diru ne!

Tie, kie ĉiuj ĝojkrias, sentu aflikton,

Tie, kie ĉiuj krias, ne krii,

Tie, kie ĉiuj scias, ankoraŭ demandu,

Tie, kie ĉiuj trovas, daŭre serĉu!

Tie, kie ĉiuj iras for, iru tien.

Tie, kie ĉiuj falas, staru sole.

Tie, kie ĉiuj silentas, krii, krii laŭte

Tie, kie ĉiuj restas, romp-eliru!

Tie, kie ĉiuj silentas, krii, krii laŭte!

MI DESTINO

Lingvo. La hispana.

T. & M. Iber Maravi Olarte, eksministro de Peruo.

Ar. Rik Decramer

Kelkaj diras
ke mi ne iru kontraŭ la vento.
Aliaj diras
ke mi tenu min flanke de la rivero.

Ne, ne, ne, ne tiel mi estas.
Mi faras tion, kion mi kredas devi fari.
Mi montras min kiel mi estas
Kaj defendas mian idealon.

Kaj mia idealo neniam estos
Ofendo al la homaro.
Mi estas kuraĝa sed ankaŭ
estaĵo sentema.

Ludante sur mia ĉarango
Mi prikantas miajn revojn
Kaj en la okuloj de knabino
Mi vidas promesplenan estontecon.
Kaj ili diru kion ili diras.
Ili ne timigas min.
Ili faru kion ili faras.
Mi daŭrigos la batalon.

Mi estas tia homo
Kiu ne dronas en siaj larmoj
Tiel iam estis mia destino
Aj! Kia bela destino:
Vivi kiel digna homo.

Kelkaj diras al mi:
"Mallaŭtigu vian voĉon, estu singarda!"
Aliaj diras al mi:
"Kiam vi vidas ion, afektu kvazaŭ vi ne vidis ĝin."

Ne, mi ne povas ŝajni,
Mi denuncas tion, kio denunciendas.
Batalante sincere,
mi ne timas kion oni diros.

Mi postulas miajn rajtojn
Kaj la registoj diras
Ke hodiaŭ postuli siajn rajtojn
nur eblas kune kun repaciĝo.

Ne, ne, ne, ĉi tie en mia lando
tio nomiĝas humiligo
Kaj se justa krio leviĝas
Ili onin akuzas pro ŝtatrenverso.

SOLEIL

Lingvo. La franca.

T. & M. Grégoire, franca kantisto.

Ar. Rik Decramer.

Ni ne havas la saman flagon,
nek la saman haŭtkoloron.
Ni ne havas la saman lingvon,
nek la saman kulturon, aŭ la samajn bildojn.

Ni ne havas la samajn radikojn,
nek la samajn idolojn, kiuj nin fascinas,
sed ĉiu el ni vivas
kun la sama sangokoloro.

Refr. 1

Ĉar ni havas la saman sunon
kaj la saman lunon super nia dormo.
Kaj ni ĉiuj havas manon por premi.
Ĉu ni vere ankoraŭ rajtas atendi?

Ni ne havas la samajn kutimojn,
Ni havas aliajn ritojn, aliajn vestaĵojn.
Ni ne havas la samajn rakontojn,
Sed nia miksaĵo kreas nian historion.

Ni ne havas la samajn gepatrojn
Sed ni ankoraŭ ĉiuj estas infanoj,
Kaj ĉiuj devenas el hommiksaĵo,
Ni iĝas frenezaj, sed ni naskiĝis tiel saĝaj.

Refr. 1

Refr. 2

Ĉar ni havas la saman planedon
Kiu petegas ne esti tiel stulta.
Kaj ni ĉiuj havas manon por premi.
Ĉu ni vere ankoraŭ rajtas atendi?

Mano kun niaj diferencoj
Kaj la povo igi ŝancon el ĝi.

Refr. 1

Refr. 2

BLOWIN' IN THE WIND

Lingvo. La angla k.a.

T. & M. Bob Dylan, usona kantisto, nobelpremiito

Ar. Rik Decramer

Kiom da vojoj viro devas esti irinta
Antaŭ ol vi povas nomi lin viro?
Super kiom da maroj blanka kolombo devas esti fluginta
antaŭ ol ĝi dormas en la sablo?

Kiom ofte kanonkugloj devas flugi
antaŭ ol ili poreterne estu ekzilitaj?
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento.
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento.

Germanlingva

La respondon, mia amiko, nur scias la vento.

La respondon nur scias la vento.

Dum kiom da jaroj monto povas ekzisti
antaŭ ol ĝi estus forlavita de la maro?
Dum kiom da jaroj iuj homoj devas ekzisti
Antaŭ ol ili ricevas la liberecon.

Kaj kiom ofte viro povas forturni la kapon
Kaj ŝajni kvazaŭ li ne ne vidas ĝin?
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento

Franclingva

Aŭskultu mia amiko,

aŭskultu en la vento.

Aŭskultu la respondon en la vento.

Kiom ofte viro devas rigardi supren
antaŭ ol li povas vidi la ĉielon?
Kaj kiom da oreloj viro devas havi
antaŭ li aŭdas homojn plori?

Kaj kiom da mortintoj necesas antaŭ ol li scias
Ke jam multe tro multaj mortis.
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento
La respondo, mia amiko, flugas kun la vento

Nederlandlingva

*La respondo, mia amiko,
Tion donas la vento.
La respondon nur donas la vento.*

La respondo flugas en la vento.

SOLO LE PIDO A DIOS

Lingvo. La hispana.

T. & M. León Gieco, argentina kantisto.

Ar. Rik Decramer

Mi petas de Dio nur
ke mi ne restu indiferenta por la sufero:
por ke la seka morto ne trovu min,
malplenan kaj solan, ne farintan sufiĉe.

Mi petas de Dio nur
ke mi ne restu indiferenta por la maljusteco;
Por ke oni ne frapu min sur la aliaj vango
Post kiam ungego forgratis tiun mian bonŝancon.

Mi petas de Dio nur
ke mi ne restu indiferenta por la milito;
Estas granda monstro kiu perforte piedpremas
la povran senkulpon de la popolo.

Estas granda monstro kiu perforte piedpremas
la povran senkulpon de la popolo.

Mi petas de Dio nur
ke mi ne restu indiferenta por la trompo;
se unu perfidulo havas pli da povo ol kelkaj unuopuloj,
Ke tiuj unuopuloj ne facile forgesos tion.

Mi petas de Dio nur
ke la estonteco ne lasu min indiferenta;
senespera estas tiu kiu devige
iras vivi en alian kulturon.

Mi petas de Dio nur
ke mi ne restu indiferenta por la milito;
Estas granda monstro kiu perforte piedpremas
la povran senkulpon de la popolo.

Estas granda monstro kiu perforte piedpremas
la povran senkulpon de la popolo.

HOBIO PROFESIO

(Vidu ekranon)

PASSENDALE TERMINUS

Lingvo. La okcident-flandra.

T. , M. kaj Ar. Rik Decramer

Pri ĝi oni verkis librojn, pri ĝi oni skulptis monumentojn,
Kortuŝaj kantoj kantitaj kaj poemaroj faritaj.
Geavoj rakontas pri ĝi, muzeoj estas fonditaj,
Pri ĝi oni blovis memorigojn kaj pinglis medalojn.

Floreskas rozoj kaj siringoj, de la fronto nenio plu videblas.
Kial ankoraŭ menci tiun militon? La mizero ja longe pasis.

Grenadojn oni brilis kaj metis antaŭ la fenestron,
la veteranaro ŝrumpinta kaj stratoj nomitaj laŭ heroo.
La papavoj ĉiutage ruĝas, koronforme deponitaj,
Ili ornamas la tombon de soldatoj, honorigitaj poreterne.

Floreskas rozoj kaj siringoj, la pasinteco dolĉe endormigita,
Ja ne veku la mortintojn, lasu iliajn amojn trankvilaj.

Sed kiu priskribas la noktojn de William, 17-jaraĝa
Kiu, freneza pro timo, atendas la lastan aŭroron?
Kaj kiu komprenas la lamenton de lia patrino trans la maro
Ĝis en la ĉielo ĝi sonas: "Dio ve, sendu ilin reen hejmen".

Pro tio oni devas verki librojn, pro tio oni daŭre devas fari
kantojn,
Pro tio oni devas legi poemojn, memorojn skulptitajn en
nia koro.

Por ke ni neniam, neniam forgesu
La frenezon de la milita perforto,
Orkestritan de homoj sen konscienco,
Nur sopirantaj al potenco kaj mono.

EL HIMNO DE LA PAZ

Lingvo. La hispana.

T. & M. Joaquin Bello (Ĉilio).

Ar. Carlos De Soete.

Refr.

Paco, paco, paco.

La mondo petas pacon.

Serĉu la pacon en vi mem,

Kaj disportu ĝin tutmonden.

Nur paco alportas pacon

Milito kauzas militon.

Paco estas la fratino de amo:

Se tiu venkas, ne estas malvenkintoj.

Paco estas la forto per kiu

la suno leviĝas ĉiun tagon.

Paco estas la monda konscienco

kiu ripozas senkulpe.

Refr.

Semu la arbon de la paco

kien ajn vi iras

kaj la ĉielo prilumos

la semon per via paco.

Nur se vi havas la pacon

vi povas doni ĝin.

Paco ne estas dekreto,

estas vivmaniero,

vojo kiun oni devas sekvi.

Refr.

ON THE ROAD TO PASSCHENDAELE*

Lingvo. La angla.

T. & M. Alan G. Brydon, skota kantisto.

Ar. Rik Decramer.

Lumo brilas en Flandrio
kiel lumturo por la herooj.
El la fora pasinteco ĝi vagas
por memori la vivojn kiujn ili oferis.
Kaj ĝi instruas al ĉiu generacio
esti saĝa kaj neniam forgesi
memori tiujn kiuj pereis
sur la vojo al Passchendaele.

Refr.

Sur la vojo al Passchendaele, sur la vojo al Passchendaele,
kie la herooj poreterne vivos.
Sur la vojo al Passchendaele.

Venu kun mi kaj al vi mi montrus
Kial ĉiuj militoj iam devos ĉesi.
Promenu inter la tombŝtonoj
Kaj viaj larmoj ploros por paco.
Ĉar la spiritoj vagas en Flandrio,
Vi povas aŭdi ilian funebran lamenton.
Por la herooj, kiuj tiam vivis sian vivon
Sur la vojo al Passchendaele.

Refr.

(*) Passendale, estas vilaĝo inter Ieper kaj Roeselare. Dum la Unua Mondmilito ĝi estis la scenejo de terura batalo en kiu mortis multege da homoj. Ne senkiale la britoj nomis ĝin Passion-dale [sufero-valo],

KUTIME KELKFOJE

(Vidu ekranon)

BALLADE

Lingvo. La franca.

T. Renaud, franca socikritka kantisto.

M. Tradicia kanto el Irlando.

Ar. Rik Decramer.

Mi volis **planti** oranĝujon,
tie kie kanto neniam ĝin vidus
kie la arboj neniam donis ion alian
ol grenadojn funkcipretajn.

Kaj ĝis ĉie, kie necesis
Mi trakrozis la terglobon.
Mi diris al la batantaj homoj:
“Mi venas planti oranĝujon”.

Ni trinku glason, ni iru fiŝkapti.
Neniu milito daŭros.
tiel longe, kiel la biero kaj la amikeco
kaj la muziko igos nin kanti.

Mi serĉis sed ne trovis
sub kiu kruco la amo sin sentas bona.
Estas la homoj, ne la pastroj
kiuj kreskigas la oranĝujojn.

Mi volis planti oranĝujon,
tie kie kanto neniam ĝin vidus.
Ĝi floreskis kaj donis fruktojn:
La dolĉan frukton de la libereco.

DOE IETS VOOR VREDE

Lingvo. La nederlanda.

T. , M. kaj Ar. Rik Decramer.

La kanto estis la kontribuaĵo de Vamos pra Lutar al la Internacia Festivalo de Korusoj por Paco.

Refr.

Paco, paco, faru ion por paco.
Sendu la kolombon de paco kune kun la vento
kune kun la vento trans la maro
kiu kunligas ĉiujn landojn/homojn sur la tero.

Strofo 1:

"Paco", vorto por kanti laŭte
sur la ruino, bruligita urbo
kontraŭ lipoj forte frostitaj
de la malespero en malvarma nokto.

Strofo 2:

Paco, kolorigu poppies* en flandraj kampoj
de sange ruĝa al brile blanka.
Por ke ilia espero alportu pacon
Por la estonteco, kredu kaj preĝu.

Refr.

Strofo 3:

Paco, neniu infano iam povas marŝi,
ne donu pafilon en ĝiajn manojn.
Ne instru al li la kuraĝon perei
sur la falsa kampo de honoro.

Strofo 4:

Paco, kantu altvoĉe kaj sen fino:
paco valoras la penon
La pasinteco pruvis:
neniam milito naskis bonfarton.

(*) Karesnomo por papavo, kiu abundis en la flandraj batalejoj.

HAPANA KUCHOMA

Lingvo. La svahila.

T. & M. J.M. Kawendé (Kongo Kinŝaso).

Ar. Rik Decramer.

Refr.

Ne bruligu la teron.

Ne detruu la naturon, (2x)

Sed respektu ĝin.

Str. 1

Tie supre en la ĉielo prilumas

La suno, la luno kaj la steloj

Kaj matene kaj vespere

Kaj nokte la tutan mondon.

Refr.

Str. 2

Se vi bruligas la ĝangalon

Vi mortigas la arbaron, la bestojn,

la birdojn, la insektojn

kaj la fruktojn de la tero.

Ne ĵetu venenon en la akvon,

Ne poluu la maron.

Refr.

Str. 3

Rigardu la ordon kiu regis

Ĉe la ekesto de la kreitaĵaro.

Kiel la kreinto konservas tiun ordon,

Tiel ni devas respekti lian kreaĵon.

Refr.

PEACE WILL COME

Lingvo. La angla k.a.

T. & M. Tom Paxton, usona kantisto.

Ar. Rik Decramer.

Refr. 1

Paco venos, paco venos

Ĝi komencu ĉe mi.

Refr. 2

Ni, ni ĉiuj,

Ni sopiras al paco.

Lasu ĝin komenciĝi ĉe mi.

Refr. 3

Ho, mia propra vivo

Estas ĉio kion mi esperas regi.

Ho, por ke mi vivu mian vivon por la bono,

la bono de mia animo.

Ĝi alportu...

Refr. 1

Refr. 4

Ni,

Ni ĉi tie

Ni ĉiuj

Sopiras al paco kaj kvieto.

Ho, paco ne falas el si mem en vian manon.

Ho, laboru pri ĝi laŭ bona spirito

Kun via tuta koro.

Labori pri...

Refr. 1 (2x)

Refr. 2

Refr. 3

Refr. 1 (2x)